# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

PLENUMITA 18/01/2024 sescentsepdeka eldono (unua eldono 26/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN CIRKAU-5 MINUTAN AUSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

**Ĉu la homoj ĉesas telefone interparoli?**

11a de Januaro 2024 (*Roger Springer*)

## AEA kaj NZEA kunvenas

Dum la posttagmezo de ĵaŭdo 11 Jan (dum nia 2024 AEA somerkursaro) la Nov-zelanda Asocio (NZEA) kaj la Aûstralia Asocio (AEA) kunvenis reale kaj virtuale.

La temo estis - **NIAJ ESTONTAJ RILATOJ**

Homoj parolis pri kion ili preferas. Havi komunan somerkursaron aû ne.

Kelkaj de ni preferas realan, kelkaj preferas virtualan.

Ni ankaû parolis pri la subtenoj kaj la prepar-laboro.

Će la fino ni havis iomete da konsento.

*Ni daûrigos la du-landajn, komunajn somerkursarojn ( subtenatajn de ambaû asocioj)

*venontjare (2025) en Aûstralio,

*la kursaro estu reala KAJ virtuala

*NZEAanoj subtenunu la partoprenon de NZ-anoj en Aûstralio (vojaĝ kaj partoprenkostoj)

* Esperantistoj de ambaû landoj virtuale renkontos por plani la evento(j)

*Helen Palmer*



## Kun amika saluto,
## Novjara donaco: la januara numero de Esperanto

UEA kore invitas ĉiujn esperantistojn libere elŝuti kaj legi la unuan numeron de la revuo *Esperanto* el la jarkolekto 2024.

## Pli da aziaj lernantoj bonvenaj!

La sepa azia kurso celanta la nivelon B2 komenciĝos la 24-an de januaro 2024 je la 12:30 per la zoom-konto de ILEI. Jam aliĝis multaj ĉinoj kaj koreoj sed mankas japanoj, mongoloj, vjetnamoj, indonezianoj ktp. Estas klare, ke ju pli azie internacia estos la grupo des pli interesa la kurso iĝos pro komparo inter Esperanto kaj la lingvoj de la lernantoj. Bonvolu helpi trovi lernantojn. Aliĝo senpaga akireblas per mesaĝo al kursaro.sekelj@gmx.com.

## Aktivaĵoj de AVE dum 2024

Nia ekologia faka asocio AVE partoprenos per inform-tablo en februaro la Eŭropan Kongreson de la Verdaj Partioj en Liono, Francio kaj en majo ĉe la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo. AVE esepereble trovos reprezentanton por la UK en Aruŝa.

## Interlingvistoj servataj jam en la nova jaro

La unua numero de IpI por 2024 (n-ro 126) estas elŝutebla el la retejo de CED: https://interlingvistiko.net/interlingvistiko/.



La anglalingva versio de IpI, *Information for Interlinguists*, estas nun havebla ĝis n-ro 125, ĉi tie: https://interlingvistiko.net/en/interlinguistics/. Sendis *Katja Steele*

# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 18a de Januaro estos la tria sabato.

Venu! 02 9976 6320 *Roger Springer*

# El la trajno


Estas bone konstati ke kuna restado en Esperantujo multe progresigas la partoprenantojn. Kiam mi renkontis William unuan fojon kadre de la zamenhofa festo en Melburno pasintan decembron , li simple diris ke li estas komencanto kaj ne kapablas havi konversacion kun mi en Esperanto. Sed ni kune rehejmiĝis post la somerkursaro en Ballarat kaj babilis esperante dum la tuta vojaĝo , eĉ vekis la intereson de la du virinoj, kiuj sidis kontraŭ ni. Do valoras elspezi la monon, dediĉis sian tempon por somerkursaro. Plie oni lernas en ĝoja kaj amika etoso. *Franciska Toubale*



( sur la foto sendita per mia poŝtelefono sidas William Georgeson kaj Franciska Toubale )

# Vojaĝraporton de Brisbano al Ballarat. AE669

Kara Vere




Mi tralegis kun intereso vian vojaĝraporton de Brisbano al Ballarat. Mi estas iom stulta kaj geografie malvastcerba Eŭropano.

Kiam mi aĝis 20 jarojn, en 1975, mi biciklis de mia (ankaŭ denove nuna) loĝloko apud Bern al vilaĝo Wageningen apud Amsterdam, al ĉe konatulo nederlanda, tiea instruisto pri agrikulturo. Rigardu mapon ĉe vi hejme: vi vidas, ke mi pedalis 1000 kilometrojn en 7 tagoj. Sed post lego de via raporto, mi vidis viakontinentan mapon kaj ne plu miris, pro konstato de longegaj 2000 kilometroj de via vojaĝo (inkluzive de maltrafitaj strat-anguloj, kiuj subite preterpasis vin (ne vi ilin)), ke vi devis ade replen-igi vian benzinujon.

Kompreneble, vi redaktis por Aŭstralianoj, ne por mi, kaj do ne estis por ili necese aŭ oportune montri kiom multege da kilometroj vi trapasis, ĉar ili jam SCIAS. Nun, post mia malfrua konstato permapa, vi eĉ impresas min multe pli, kaj mi GRATULAS.

El via raporto, mi ne komprenis, kiom da fratinoj vi renkontis survoje, kaj kiom da ili entute havas - mi estas de miaj gepatroj unuopa infano, nun junulo de 68 jaroj. Esperanton mi scias de 40, sed eklernis mi jam en 1979/80.

Salutojn al vi el glacia ĉirkaŭ mi Svislando, sopirante/enviante la someron, kiun vi nun havas ĉirkaŭ vi.

Ueli Haenni - Nomon prononcu kiel en "m(-UELI-)lo": grajno->faruno. Kio pri "Vere"?

*Ueli Haenni*, Svislando.

**3ZZZ** Post la somerkursaro en Ballarat vizitis la radiostacion Sandor Horvat, Hoan Tran kaj Trinh thuy Huyen . Kompreneble la temo estis la kongreso/somerkursaro ĵus finiĝinta. Ĉiu raportis pri sia sperto kiel organizanto, instruisto au simpla ĉeestanto.



*Franciska Toubale*